

# ★ Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,  
ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Renormaligado per miaj okuloj

**Gvidos:** Milan Kolka

Post soveta okupacio en aŭgusto 1968 ĉeĥa registararo estis devigita per Breĵnjev persekuti homojn, kiuj aktivis dum praga printempo kaj kiuj estis kontraŭ soveta okupacio. Multaj homoj perdis laboron aŭ estis arestitaj. Kaj ankaŭ multaj homoj timis...

Pri gravaj okazaĵoj el tiu tempo ni povas nun legi aŭ aŭdi en multaj informmedioj. Sed kia estis vivo de “ordinaraj” homoj en tiu tempo? Venu kaj rakontu, kiel vi spertis jarojn de renormaligado. Ne gravas, ke vi tiam estis ankoraŭ infano.

La diskuto estos registrata kaj aperos en Jutubo. Mi petas vin, ke vi diru nur tion, kion vi volas publikigi.

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 9-an de novembro 2021 je la 18-a h.

**Kie:** La renkontiĝo okazos rete per programo Skype (Skajpo).

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebila komputilo (notebook).

*Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.*

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

## ★ Ni rekomendas

- Vizitu [Arbaristan Panteonon](#), belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto. Ĝis decembro oni povas veturi tien ankaŭ trajne.
- [Opero Sternenhoch en Nacia teatro en Prago](#). La operon komponis Ivan Acher. Ĝi estas kantata en Esperanto. Tradukis Miroslav Malovec. La opero estos prezentata la 30-an de Novembro, la 15-an kaj la 16-an de Decembro 2021.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice

## ★ Cetera programo en novembro 2021

La 16-an **Francozefaj Insuloj kaj Julius Payer** – Oldřich Arnošt Fischer, Občanský klub, Hybešova 65a

La 23-an **Kodaj nomoj** (vortludo), rete. Ni ludos kun franca esperantista grupo

La 30-an **Kiel oni verku vortarojn** – Miroslav Malovec, Občanský klub, Hybešova 65a, Brno (plej proksimaj tramhaltejoj Hybešova kaj Václavská, linioj 1 kaj 2)



## Poznámka k protiepidemickým opatřením

Omlouvám se Vám všem za dopis, který jste před týdnem dostali od jisté osoby. Opravdu jsem netušil, jakou reakci může vyvolat pozvánka na náš program. Většina z Vás asi chápe, že protiepidemická opatření nevytváří Klub esperantistů Brno. Nařízení platí pro všechny, ať se nám to líbí nebo ne. Já jako předseda klubu a organizátor našich schůzek za naši činnost odpovídám. Platí-li tu nějaké nařízení, které se týká našeho fungování, považuji za svoji povinnost Vás s ním seznámit.

V naší zemi snad ještě právo funguje. Jestliže se Vám nějaké opatření nelíbí, stále zde existují prostředky, jak poukázat na jejich nevhodnost. Například některá opatření se musela předělávat kvůli rozhodnutí soudu.

Klub esperantistů Brno není zdravotnickou organizací. Ke smyslu opatření se tedy jako organizace vyjadřovat nebudeme.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo ([https://eventaservo.org/o/EO\\_Brno](https://eventaservo.org/o/EO_Brno))

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka  
prezidanto

[Odpověď](#) [Odp. všem](#) [Přeposlat](#) [Smazat](#) [Nahlásit spam](#)  
[Další akce](#)